

357
1-2-1958

9

La Policisto



Oficiala Organo de la „**Universala**
Ĵurnalista Konfederacio”



Redakcia Direktoro: A. H. de MARICH.
 Centra Administracio: Budapeŝt, IX., Ŭilói-ut 59. IV. 8. (Hungario);
 Telefono: J. 98-34.

Redaktoro: EDGAR GROTT L. O., U. Jo. Ko. Prov. Direkt. por U. Jo. Ko.
 Helpredaktoro: J. KRUMIUS (Riga).
 Redakcio: Riga (Latvuj) Elizabetes iela No 9, dz 33.

Amsterdam - Bruxelles - Berlin - Budapeŝt - Helsinko - Kopenhago - Kannas
 - London - Madrid - Melbourne - New-York - Oslo - Paris - Pekin - Riga - Rio
 de Janeiro - Roma - San Francisco - Stockholm - Tallin - Tokio - Warszawa - Wien.

Abonprezo kune kun membreco, jarlibro, revuo, ĉiuj aliaj revuoj de la „T.
 L. O.“, korespondancon en la jarlibro kaj revuo: por Eŭropo, 1 por Ekster-
 eŭropo 2 usonaj Dolaroj. Monsendaĵoj per rekomenditaj bonfermitaj leteroj al
 la centra administracio; redakciaj korespondataĵoj al la redakcio estas sendotaj.

Alvoko.

al ge-kolegoj ĵurnalistoj de la tuta mondo

Ekzistas universalaj asocioj por diversaj celoj kaj fakoj. Nur la socia opinio, la konscienco de l'homaro — la ĵurnalismo ne estas ĝis nun organizita. Tiun gravan mankon, ge-kolegoj, ni likvidu. La pezegan taskon de iniciato kaj organizo la estraro de Tutmonda Ligo de la Ordo ŝarĝis sur min. Obeinte al la grava afero, mi decidis akcepti provizoran organizon estrecon de, al politiko kaj religio neŭtrala profesia, *Universala Ĵurnalista Konfederacio*. — Naciara Ligo de ĵurnalistoj sur la bazo de Esperanto kaj frateco de rasoj. Sub la aŭspicio kaj potenca patronado de la Tutmonda Ligo de la Ordo, ni faru Ordon ankaŭ en la ĵurnalismo kaj ordiginte ĝin laŭ ses federacioj kun ĝiaj sekcioj, ni faru nian Konfederacion — Edukejo. Ni pensu profundege, ĝis etaj detaloj. Nia politiko, nia senpolitika politiko estu: pura konscienco, flua stilo, belsona Esperanto, reciproka servo. La ĉeftono de nia organo estos: tutmonda frateco. Ni akcelu et-nuancan kaj altan evoluon de la plej malgrandaj nacioj kaj eĉ gentoj. Niaj sekcioj estu kristal-klaraj tonoj; niaj Federacioj — akordoj; nia Konfederacio — Orepoka Simfonio. Oni diras: Ameriko laboras, Azio revas. Labore revante kaj reve laborante ni potence efektivigos niajn plej belajn revojn. Elektro, radio, Esperanto, aeroplanoj — ĉio siatempe estis freneza revo — nun jam ĉiutaga preskaŭ banalaĵo. Ĉiu komenco estas malfacila. Sed bona komenco estas jam duanfarita laboro. Ni kontraŭbatalos: pornografion, alkoholismon, klasbatalon; religiajn disputojn. Ni akcelos: mondpacon, fratecon de rasoj, individue naciajn kulturojn, modernan politikon kaj ĝian tutmondan unuecon kaj organismon, Esperanton kaj kulturan evoluon. Ni aranĝos universalan gazetservon per interŝanĝo de artikoloj niafakaj. Ĉiu sekcio, almenaŭ dumonate unufoje sendu raporton pri sia lando, rilate al la tiea stato, okazintaĵoj ĵurnalistaj. Ĉiujn raportojn ni presigos en nia centra fakorgano. Ĉiujare ni aranĝos kongreson, kie ni prilaboros kaj pridiskutos niajn plej aktualajn temojn. Nia Konfederacio estas organisma parto de la „Tutmonda Ligo de la Ordo“ sub kies egido jam sin organizis la tutmonda policaro kaj la anoj de diversaj branĉoj de trafiko kaj komunikado (poŝto, telegrafo, fervojo, marismo, aeronautiko K. C.) Niaj ĝeneralaj statutoj estas tiuj de la Tutmonda Ligo de la Ordo, niajn specialajn fakostatutojn ni starigos dum nia I. mondkongreso, verŝajne en monato Julio 1925.

Nia konfederacio celos ĉefe la emancipigon de la ĵurnalista konscienco de ĉiuj ajn influoj por povi korekte servi la porhamaran kulturon, kiel indaj apostoloj de nefalsigita vero. Ni devas starigi nian internacian forumon, kies voĉo tondre proklamos al la malsana homaro nian veron — la plej puran. Ni bezonas posedi internaciajn instituciojn, fakajn, ekonomiajn, bonfarajn kaj sociajn. Ni estas la iniciantoj de publika konscienco kaj nia plej sankta devo estas malebligi ĉiun ajn maljustecon, do ni devas krei fortan kaj internacian forumon, kiel kunigaj kadroj al nia laboro, al nia ekzisto. Ge-fratoj ĵurnalistoj! Represigu ĉi tiun alvokon en ĉiujn Viajn organojn kaj amase Vin anoncu kiel anoj al nia konfederacio. Ni akceptas nur individuajn membrojn, kiel ordinarajn plenrajtajn anojn, sed kiel protektantojn ni akceptos ankaŭ ĉiun presan klubon, ĵurnalistan, verkistan, eldonistan, presartan, radian, ekspedician — nacian kaj internacian unuigon k. t. p. Provizora jarkotizo estas por individuaj anoj 1 Dolaro (Kune kun membreco, oficiala organo, jarlibro kaj ne-komercaj anoncoj pri deziroj, demandoj, korespondo K. C.) Ni devas efektivigi internacian ĵurnalistan universitaton, interŝanĝan sistemon de personoj kaj ĉiujn ceterajn, kio nin fortigos. Nia situo ofte malebligas al ni veran, kolegan interrilaton. Ni devas ankaŭ tion efektivigi.

Ĉiuj demandoj, aliĝoj, korespondataĵoj kaj proponoj devas esti sendataj al Edgardo Grot, redaktoro, provizora organiza direktoro de la „Universala Ĵurnalista Konfederacio“. (Eŭropo, Latvio, Riga, Elizabetes iela 9, dz. 33, aŭ Pasta Kaste 844, Latvio-Riga-Eŭropo).

Kun kolega korsaluto

Edgardo Grot. T. L. O., U. G. K.

Provizora skemo

de la Universala Ĵurnalista Konfederacio.

Tutmonda Ligo de la Ordo (sidejo — Budapeŝt-Hungarlando) — la patrono de *Universala Ĵurnalista Konfederacio*, ĝenerala organiza prezidejo en Riga, Latvio (Eŭropo) — provizore. La Universala Ĵurnalista Konfederacio konsistas el ses Federacioj:

I. Eŭropa Ĵurnalista Federacio konsistas el sekcioj: 1. Romana sekcio: a) Rumana, b) Franca, c) Itala, d) Hispana, e) Kataluna, f)

Portugala, g) Belga; 2. Germana (grandnacia) sekcio: a) Germana, b) Aŭŝtria; 3. Germana (malgrandnacia) sekcio: a) Norvega, b) Sveda, c) Dana, d) Holanda e) Flandra; 4. Slava sekcio: a) Pola, b) Ĉeĥa, c) Slovaka, d) Serba, e) Bulgara; 5. Finna-Ugora sekcio: a) Hungara, b) Suoma, c) Estona, d) Liva, e) Zirjara, f) Lapona, g) Samojeda. 6. Litova sekcio: a) Latva, b) Litova, c) Latgala. 7. Sekcio de Eŭropaj praloĝantoj: a) Greka, b) Albana, c) Vaska, d) Kimra, e) Bretona.

II. Grand-Britia Ĵurnalista Federacio konsistas el sekcioj: 1. Anglia sekcio: a) Irlanda, b) Skotia, c) Anglia; 2. Hindia sekcio, 3. Kanada sekcio, 4. Sud-Afrika sekcio, 5. Aŭŝtralia sekcio, 6. Negra sekcio.

III. Amerika Ĵurnalista Federacio konsistas el sekcioj: 1. Usona: a) Usonana, b) Mormona, c) Kalifornia, d) Negra, e) Indiana (indianoj-praloĝantoj); 2. Hispana sekcio: ĉiu hispanlingva respubliko organizas unu sekcion; 3. Brazilia sekcio.

IV. Tut-Budhista Ĵurnalista Federacio konsistas el sekcioj: 1. Ĉina, 2. Japana, 3. Mongola-Burjata, 4. Birma, 5. Siama, 6. Ho-sena (Korea), 7. Kalmika, 8. Anama, 9. Cejlona, 10. Tibeta sekcio: a) Tibeta, b) Sikima, c) Nepala, d) Bhotana, 11. Kamboĝa, 12. Koŝinĉina.

V. Islama Ĵurnalista Federacio konsistas el sekcioj: 1. Persa, 2. Turka, 3. Hindia, 4. Java, 5. Avgana, 6. Araba, 7. Egiptia sekcio: a) Egipta, b) Sudana, 8. Maroka, 9. Alĝeria, 10. Tunisa, 11. Sahara, 12. Tripolia, 13. Palestena, 14. Taĝika, 15. Sarta, 16. Turkmena, 17. Kurda, 18. Buhara, 19. Ĥiva.

VI. Federacio por eventualaj ceteraj kaj aliaj grupiĝoj.

Oficiala organo de la „Universala Ĵurnalista Konfederacio“ estas: „La Ĵurnalisto“ — centra redakcio: Riga, Latvio (Eŭropo), Elizabetes iela 9, dz. 33. Ĉefredaktoro: Edgardo Grot. La gazeto aperas unuatempe laŭ bezono kaj neceso poste ĉiumonate.

Litova sekciaro.

(Sekcioj: Latva, Litova, Latgala)
Akordigo meze de Latvia preso.

Per tiaj vortoj ni povas karakterizi la 7. de januaro okazintan malfermon de Latvia Presa Klubo. Ĉe simila akordigo, kie renkontiĝas diverstonaj kontraŭaj interesoj, ĝi ne povas esti ideala. Sed la lasta akordo igas esperi, ke la laboristoj sur ĵurnalista kampo, kiuj laboras tag-al tago super la plej komplikitaj demandoj, trovis lokon, harmonie krucigi siajn kontraŭajn opiniojn. Ke tiu bezono maturiĝis, tion esprimis la organiza prezidanto de Latvia presa klubo, sinjoro A. Bilmanis. Je la komenco de la soleno oni kantis la nacian himnon „Dievs, sveti Latviu“ — „Dio, benu Latvion“, La gastoj, meze de kiuj troviĝis la respublika prezidanto prof. Ĉakste, la parlamenta vic-prezidanto Petrovics, deputatoj, registaranoj, preskaŭ la tuta diplomacia korpuso, eminentaj sociaj agantoj, de ĉiuj Latviaj nacioj — kuniĝas en Litvia himno-kantado. Post konciza referato de Bilmanis pri la etapoj de fondado de Latvia presa klubo, pri ĝiaj celoj kaj taskoj, akcentante, ke en nia ĉefurbo necesa estas centro, kie renkontiĝi povus presagantoj por intersanĝi opiniojn por interpaciigi kontrastojn. Post li parolis respublika prezidanto prof. Ĉakste. Preso estas la esprimanto de socia opinio. Tiun opinion oni povas direkti al bono kaj malbono. Preso estas puriganto; ĝin sekvante, la socia opinio fariĝu fortiganto de ŝtataj fundamentoj. Presa klubo fidele servu al vero, ĝi esperi povos la favoron de la registaro. Je l' nomo de parlamenta prezidanto s-o Petrovics komparas preson kun parlamento. Preso en Latvio estis la unua parlamento. Nur post ĝi povis aperi la dua parlamento, la naciaj deputitoj. Je l' nomo de naciaj malplimulto (minoritoj) parolis D-ro Šiman, ĉefredaktoro de „Rigasche Rundschau“, pri vertikala kaj horizontala socia opinio. Li deziras, ke en la klubo kresku la horizontala opinio, kiu kreas por la bono de Latvio honestan, reciprokan konfidon meze de ĉiuj Latviaj civitanoj. Je registara nomo salutas ministro por eksteraj aferoj s-o Mejerovics. Inter politiko kaj preso ekzistu unio ĉe la laboro super la ŝtata evoluigo. Preso estu preciza spegulo, per kiu la socio vidu la agadon de la registaro. De la diplomacia korpuso parolis ĝia plejaĝulo — Svedia ministro Unden. Redaktoro de „Latvis“, s-o Asars invitis, ke preso ĉiam restu idee libera. Nunaperis generalo Balodis, sekvata de aplaŭdoj. Post li la vorto apartenis al A. Bēnjaminš, eldonanto de „Jaunakas Zinas“, gazeto plej disvastigita en Latvio. Li memorigas kiel ekestis la demando pri neceso de Latvia presa klubo. Kun taŭgaj komparoj, li montris, ke eble estos trovi elirejon por la akordigo de diversaj direktoj. Por atingi tiun celon, fondita estas Litvia presa klubo, kie, kvazaŭ en fortikaĵo enigitaj, interkompreniĝos diversopiniaj presagantoj. Li salutas la, por harmoniiga laboro, de minoritoj etenditan manon. Se la presa klubo kapablos servi al akordiga ideo, tiam plu ne estos la minorita demando. De minorita preso ankoraŭ kelkaj parolantoj esprimis sian kontenton pri tio, ke fondita estas intima loko por intersanĝo de opinioj kaj ebenigo de akraj rilatoj meze de presagantoj. Pri tiu temo de minoritoj per elkoraj vortoj ankoraŭ parolis S-o Tejtelbaum. Interese parolis la ĉef-urbestro Andersons, kiu pro gravaj oficaj laboroj, venis malfruente. Lia parolis kun trafikaj deziresprimoj, ke en Litvia presa klubo renkontiĝu kaj interkompreniĝu la tutmonda preso. Korajn vortojn dediĉis eksterlandaj reprezentantoj, kies paroladoj akompanantaj estis per ovacioj kaj ludado de iliaj naciaj himnoj. La salutoj en litva lingvo de Estonia rajtigita ministro Seljamaa kaj Finnlanda rajtigita ministro Silvander — renkontis grandan aprobon. Same la amikeco-deklaro de Polia ambasadoro Lados. Iliaj naciaj himnoj kaj la ovacioj atestis, ke la socia opinio, kiu sin demonstris en la presa klubo, estas certa garantiato. Same esprimiĝis ankoraŭ la aliaj reprezentantoj de, al Latvio favoraj ŝtatoj: Usona ministro Kollemann kaj Japania ambasadoro Ojeda. La laŭtegaj ovacioj al la lasta memorigis, ke estis Japanio, kiu la unua ekskuis la rusan giganton. Telegrafe salutis: Litovia ambasadoro Aukštuolis; Riga borsa prezidanto Zebergs;

Latvia ambasadoro en Litvio — Balodis; senata prezidanto Valters; Riga komandanto Asmans; Haralds Eldgasts, redaktoro de „Kurzemes Vārds“ en Liepaja; prof. Vitols, la rektoro de Latvia konzervatorio; Ringolds Kalnings — Direktoro de Latvia banko.

Centro por Litvia preso estas kreita. Restas nur deziri ke la „dumbaptaj“ deziresprimoj kaj esperoj potence efektiviĝu.

„Jaunakas Zinas“, Riga.

Latvia statistiko.

En Latvio regule aperas 115 latvaj gazetoj (eldonoj semajnaj, monataj kaj kelkmonataj), 11 germanaj, 7 rusaj, 3 anglaj kaj 2 hebreaĵoj.

31 latvaj ĵurnaloj (eldonoj duontagaj, tagaj kaj duonsemajnaj), 6 rusaj, 5 germanaj kaj 3 hebreaĵoj. Entute registritaj estas 183 ĵurnaloj kaj gazetoj. G.

Pri la titolpaĝaj simboloj.

Sur la titolpaĝo ni supre vidas sep-pintan stelon — Eŭropa Ĵurnalista Federo kun ĝiaj sep sekciaroj. Malsupre maldekstre troviĝas svastiko (hok-kruco), simbolo de Budhismo. Per ĝi ni signas la Tut-Budhistan Ĵurnalistan Federon. Nia opinio nur tiu simbolo estas unuiga por la landoj de Budhismo mondpercepto, kulturo kaj moroj. Nomi ĝin Orient-Azia Federo ne estus ĝuste, ĉar ankaŭ Islamo, per Hindio kaj Java insulo, eniras la Orientan Azion. La duonluno kun steleto kompreneble signifas Islaman Ĵurnalistan Federon. Grand-Britia standardo al ĉiuj estas konata. Por Amerika Ĵurnalista Federo ni elektis 3-flankan piramidon, kio signas la 3 sekciarojn (Brazilan, Usonan kaj hispanlingvajn respublikojn). Estas kutime al Egiptio aljuĝata la kvazaŭa monopolarajto pri posedo de piramidoj. Sed estas granda demando, kiuj piramidoj estas pli antikvaj, ĉu tiuj de Egiptio, aŭ la piramidoj de Perua, Meksikia kaj Jukatana prakulturo de majosoj, aztekoj kaj tlavatoj?

Se la ge-kolegoj de koncernaj landoj trovas pli trafajn unuigajn simbolojn por iliaj Federoj, — „ili venu sur la paĝojn“ de „La Ĵurnalisto“ kun siaj proponoj. La Redakcio.

Rond-demanda letero de „La Ĵurnalisto“ al nuntempaj eminentuloj.

Althonorata Sinjoro Moŝto!

Bonvolu afable esti, honorigi nin kaj plifortigi niajn klopodojn per Via alŝatata valora respondo al la subsekvantaj demandoj:

1. Kia eco kaj kia tasko de la ĵurnalisto estas la plejvalora por la homaro?

2. Ĉu la ĵurnalisto ne estas kulpa pro siaj tendencaj artikoloj en la kaŭzigo de la mondkatastrofoj?

3. Ĉu la ĵurnalista plumo ne estus pli honorinda, se ĝi simple nur registrus sentendence kaj anstataŭ subjektive ĝi objektive kritikus?

4. Ĉu la espero pri alveno de pli feliĉaj, pli bonaj tempoj ne estas forte kunligata kun la ali-formiĝo de la ĵurnalisto?

5. Ĉu la emancipigo de la ĵurnalisto estas eble desub la premiga influo de la postuloj de la publiko kaj ĉu ĉi tiu subpremo povas esti anstataŭigebla per edukinfluo de la ĵurnalisto al la publiko, aŭ la ekonomia eldonentrepreno jam poreterne dungis la sendependan konsciencon de la ĵurnalisto?

6. Ĉu per fondiĝo de tutmonda, forta, sendependa forumo de la libera ĵurnalisto, per la efektiviĝo de tutmonda ĵurnalisto estas atendebla kontentiga ŝanĝiĝo en ĉi tiu porhomara gravega problemo kiun oni tiel kutimas nomi la „gazetara grandpotenco“, kiu nuntempe ne ekskluzive servas la bonon de la homaro?

7. Ĉu la tutmonda eminentularo havus la inklino partopreni, helpi kunlabori en ĉi tiu universitato de la mondkonscienco? kaj Via Moŝto?

Altestime la Redakcio de „La Ĵurnalisto“.

Niaj profesiaj taskoj. En la unua momento ni eĉ ne povas trarigardi la tutan perspektivon de la graveco de nia faktigo. Ĝi vastiĝas ĉiutage. Por la tuja pripensado ni volas nur citi tion, ke la cerba kaj nerva laboro de la ĵurnalisto estas tiu fonto el kiu ĉerpas profitojn — aliaj personoj. Tiu ĉi afero kaŭziĝas ĉefe pro la senorganizado de nia fako. Nia laboro apartenas al la tuta homaro kaj transflugas la landlimojn. Nia organizato devas esti tutmonda kaj forta.

ni tutmonde org-niziĝos, tiam nia voĉopeze falas en ĉi tiun mezurilon de kies balancado dependas ofte la sorto de gentoj kaj popoloj. Ni devas rekonigi tutmonde la gravecon kaj purecon, la valoron kaj signifon de nia alta profesio. Ni devas fondi praktikajn aranĝaĵojn por plifaciligi nian mobilecon, nian vigecon kaj nian prosperon. Gravegaj fakaj demandoj ekonomiaj problemoj atendas solvon de ni. Ni devas starigi universalan internacian ĵurnalistan universitaton, ni devas efektiviĝi la internacian artikolperigadkontoron, pere nia ligo. Ni devas efektiviĝi tiajn instituciojn pri kies efektiviĝo jam klopodas niaj alifakaj fratigoj. Serioza laboro atendas nin, sed la fruktoj de nia laboro indas por penadi. Kaj ni devas doni al la mondo pli puran mond-principon kiel la nuna plene de danĝeroj kaj mizeraj finkonkludoj! Ni devas helpi la verhomajn klopodojn: la ordon kaj la mondhelpingvon; la amon kaj pacon! Venu ĉiuj kolegoj, kunhelpu!

Historieto pri la ĵurnaloj. Interesa estas scii, ke la unua tagĵurnalo ekaperis en Londono la 11-an de Marto 1702, sub la titolo „Daily Courant.“ En Francujo la unua tagĵurnalo aperis nur la 1-an de Januaro 1777 sub la titolo „La Journal de Paris.“ En Hungarujo aperis la unua tagĵurnalo en 1830 kun la titolo „Jelenkor“ (= Nuna Epoko). La unuaj revuoj ekaperis laŭdate kaj laŭlande jene: Germanujo (Strassburg), 1609 „Zeitung“, kiu povas esti rigardata kiel la unua regula revuo; Anglujo (Londono), 1631 „News“; Francujo (Paris), 1631 „Gazette“; Svedujo 1643; Danujo 1644; Nederlando 1656; Italujo 1684; Skotujo 1699; Rusujo 1703; Aŭstrujo 1703; Usono 1704; Hungarujo 1705; Finnlando 1771; Turkujo 1825. Interese estus kompletigi ĉi tiun statistikon tiamaniere: I. ĝeneralaj revuoj (novaĵoj), kiel antaŭantoj de la tagĵurnaloj, II. tagĵurnaloj, III. fakrevuoj, (laŭdate kaj laŭnacie).

Hungara gazetara statistiko je la 1924-a jarkon. En Hungarujo regule aperis dum 1924. I. ĉiutagaj ĵurnaloj politikaj: 71 hungarlingvaj kaj 5 germanlingvaj (= 76); II. ĉiusemajnaj politikaj ĵurnaloj: 3 hungarlingvaj ĉiutagaj politikaj, 18 ĉiutagaj hungarlingvaj politikaj, 114 ĉiusemajnaj hungarlingvaj politikaj, 5 ĉiusemajnaj germanlingvaj politikaj (= 140); entute politikaj ĉiutagaj kaj ĉiusemajnaj: = 216); III. fakaj revuoj: 10 arkitektaj, matematikaj kaj fervojteknikaj; I minteknika; 5 presejaj kaj libroeldonaj; 31 amuzigaj, literaturaj, iustritaj; 4 modaj; 9 kemiaj kaj farmaciaj; 2 naturhistoriaj, 74 manufakturaj kaj industriaj; 31 komercaj; 5 ekonomiaj, 21 agrikulturaj, 4 ĝardenkulturaj; fruktokulturaj kaj vinkulturaj; 8 polcaj kaj ĝendarmaj; 5 arbaristaj kaj ĉasistaj; 10 sportaj, 2 artaj kaj artindustriaj; 6 teatraj kaj muzikartaj; 15 kuracistaj kaj ĥirurgiaj; 2 veterinaraj; 10 pedagogiaj kaj ĵurnalaj; 11 juristaj kaj statistikaj; 3 filatelistaj; 19 religiaj kaj ekleziaj; 6 porvojaĝaj; 7 oficistaj; 10 unuigaj; 4 diversaj, 1 optika, 2 spiritistaj; 1 teozofia. Inter ĉi tiuj revuoj estas 4 esperantaj, 6 germanlingvaj, 2 anglolingvaj kaj 2 francolingvaj. Oni povas ankoraŭ kalkuli 60—80 neĉiunonatajn revuojn (= 381; entute 597 gazetoj).

La tri plej disvastigitaj esperantaj revuoj: „Esperanto“ (Genevo, aperas jam de 21 jaroj); „Heroldo de Esperanto“ (Horrem, aperas jam de 5, aŭ 6 jaroj); „La Policisto“ (Budapest, aperas jam de 32 monatoj).

T. L. O-KODO:

A — arto	Me. — medaĵo
Am — amuleto	Mi — mineralo
An — antikvaĵo	Mu — muziko
Ant — Antropologio	M. M. — metalmonono
Ar — armilo	M. N. — muziknoto
Art — artaĵo, arto	M. S. — mondlingvo-
B — bildo	sistemo
Bfl — bildflanke	N. — naturo
Bl — blazono	Na — naturajo
D — desegnaĵo	Nat — naturscienco
Da — daktiloskopio	Nu — numismatiko
E — Esperanto	N. U. — neŭzita
Es — esperantaĵo	O — okultismo
Et — etnografio	Or — ordeno
Etn. — etnografiaĵo	Ov — ovo
E. L. — ekslibriso	P. — pentraĵo
E. K. — eterna kalendaro	Pa — pentraĵo
Es. L. — esperanta literaturo	Pap — papilio
Es. Li. — esp. libro	P. K. — poŝtkarto
Es. J. — esp. ĵurnalo	P. M. — poŝtmarko
F. — filatelio	P. P. M. — privatpoŝt-
Fo. — fotografio	marko
Fot — fotografajo	Pa. M. — papermunero
G. — grafologio	Po K. — popolkostumo
Ga — gazeto	Po. T. — popoltipo
Gl — glazo	Ps. — psikologio
Glu — glumarko	R. — revuo
H. — heraldiko	R. L. — rekomendita letero
He — herbo	R. K. — respondkuponon
Hi — hipnotismo	R. M. — reklammarko
Ho — horloĝo	S. — silueto
H. M. — helpmono	Se. L. — sekretaj lingvoj
I. — intersaĝas	Se S. — sekretaj sektoj
In. — interesigas	Se. Sk. — sekretaj
I. R. — ilustrita revuo	skribmanieroj
I. P. — ilustrita poŝtkarto	Sk — skarabo
I. — insekto	Sku — skulptaĵo
J. — ĵurnaloj	Sp. — spiritismo
K — korespondas	Spt. — sporto
Ko — kolektas	Su. — superŝiko
Kon — konko	S. M. — sigelmanko
Ku. — kuriozaĵo	St. G. — ŝtalgravuraĵo
K. G. — kuprogravuraĵo	St. M. — ŝtampmarkoj
K. — letero	S. — ŝakludo
L. B. — lotbileto	T — talizmano
Li — libro	T. B. — teatrbileto
Lim — limakujo	Tr B. — trambileto
Lit — litografajo	Te — teozofio
L. G. — ligno gravuraĵo	T. M. — telegrafmarko
L. K. — ludkarto	U. — nŭzita
M. — mondlingvodemando	V. — vinjetoj